

REVUO

Monata Aldono al „Esperanto Triumfonta“

NUMERO 13

1923

DEZEMBRO

Venas vok'.

*Venas vok' el valo tera,
Tremas kri' tra nokt' mizera —
Naskis nuboj
Ĝin de l' duboj,
De doloroj
Kaj de ploroj.
Rokoj eĥe ĝin redonas;
Terurige ĝi resonas.
Al la lumo, al la steloj,
Al la dioj, al ĉieloj
Trapenstras ĝi, al klaro:
Ho, kompaton al Homaro!*

*Kien kuris amo Dia?
Ĉiun celas la alia:
Domo domon,
Homo homon,
Frato fraton!
Ho, kompaton! —
La doloroj, ploroj, duboj,
De l' pekad' malpuraj ruboj
Al Infero ili fugu!
Lumo nun desupre flugu,
Kaj plenigu bono, klaro,
Ĝojo korojn de l' Homaro!*

Teo Jung.

La kristnasko de la bovoj.

Forez'a*) legendo, laŭ *Louis Mercier*.

Dum la kristnaska nokto en la Forez'a lando, kiam la mastroj kaj servistoj foriris al la diservo, kiam la farmo sub la hunda gardo endormiĝas, silenta kaj nigra en la malhela ombro, oni diras, ke tiam okazas noktomeze en la bova stalo stranga mirindaĵo: malrapide stariĝinte sur siaj nervaj kruroj super la pajlo, sur kiu dormas ilia granda korpo, la bovoj per siaj okuloj, ankoraŭ plenaj je dormemo kaj nokto, vidas ekaperi super sia manĝujo tri glorplenajn estaĵojn, kies vizaĝoj brilas kiel aprila suno ridanta sur freŝa herbo. Estas Jesuo, Mario kaj Jozefo. La Dia infano brilegas rozkolora kaj nuda sur la brakoj de sia patrino, kiu staras blanka en longa blua mantelo. Jozefo sur sia bastono apogas sian boneman manon.

Ĉar en Betlehem li estis iam revarmigita de la helpemaj bovo kaj azeno, Jesuo je ĉiu kristnasko malsuprenvenas el la Paradizo por viziti la bovojn, kiuj dormas en la stabloj. Tuj kiam ili rekonis la noblan vizitanton, granda ĝojo inundas ilian animon, kaj fleksante malrapide sian frunton al la grundo, ili adoras la infanon portitan de Nia Sinjorino. Poste ili parolas. Ĉar Dio permesis, ke dum ĉi tiu nokto ilia basa voĉo alĝustiĝu al homaj vortoj, kaj la malluma spirito enfermita en ilia karno elvidiĝas kaj esprimiĝas laŭ simplaj frazoj.

Ili parolas simple, ili rakontas sian sorton de sklavoj sindonaj al eterna peno, la laborplenajn tagojn, kiujn ili vivadas sub la pikilo ofte tinkturita per ilia sango. Ili rakontas pri siaj laboroj, de kiuj la maldankema homo ĝuas, pri la senfinaj sulkoj kavigitaj, por ke la tero donu la panon, kiun neniu el ili gustumos, kaj pri la tro maloftaj zorgoj, kiujn oni salajre donas al ili!

La bovoj parolis . . . Kaj Jesuo karesas ilin. Sub lia maneto iliaj grandegaj korpoj tremetas. Ama larmo tremetas funde de iliaj okuloj, kiam silente la vojaĝantoj malaperas. Tiam, rekuŝiĝinte, la bovoj redormas kontente. Ilia vizio finas en paca bela sonĝo, kaj — kiel rememoro al la mirindaĵo — milda lumo restas ĉirkaŭ ili.

. . . Kampulo, ne frapu ciajn bovojn; ne jungu ilin al tro peniga laboro! Se la grundo estas malmola aŭ la vojo kotega, lasu ilin laŭ ilia plaĉo malrapidi.

Se la sulko estis malfacila por fari, atendu, ke ili spiregis antaŭ ekrelabori! Provu ilin protekti kontraŭ la muŝoj kaj tabanoj, sed precipe zorgu, ke ĉe la manĝujo aŭ en la paŝtejo ĉiam ili sate manĝu, ĉar Jesuo kristnaske venos en cian stalon. Cij bovoj al li parolos, kaj ne estus vane, se ili malbenus cin kiel senkompatan mastron. La malbontraktoj pezantaj nejuste sur ili vokas sur niaj kampoj gravajn venĝojn. Kampulo, ne frapu ciajn bovojn, se ci volas, ke Jesuo benu ciajn kampojn! O. G.

*) Forez estas malnova nomo de pejzaĝo en Francujo en la regiono de Lyon.

La ŝlosilisto de paradizo.

El „Idilioj“ de Petko Todorov.

Simile al kandelo estingiĝonta en soleco, ŝia vivo apenaŭ lumetis en la domo. Ĉiuvespere, tuj kiam la knabinoj pendigis akvoportilojn sur siajn ŝultrojn, oni vidis ŝin sidanta sur la sojlo antaŭ la lago, ŝajne por aŭskulti en la dormigan brueton de l' ondoj. Malrapide, kvazaŭ en sonĝo, dum tiuj vesperoj aŭtunaj ĉio pasinta reviviĝis en ŝia memoro. En mizero kaj malriĉeco ŝi ne ĝuis junecon kaj ne povis ripozi eĉ dum la jaroj de l' maljuneco. Ŝia edzo ŝin lasis kun aro da infanoj, grade unu malpli aĝa ol alia. Nek ŝi manĝis sufiĉe, nek ŝi dormis sufiĉe, dum ŝi ilin edukis . . . Ŝia plej aĝa filo, Petro, plenkreskis kaj tuj kiam li estis kapabla perlabori panon por si mem, ankaŭ li foriris eksterlanden; do, ŝi ne povis ricevi helpon de li. Kaj kiam oni komencis persekuti lin, ŝi ne havis trankvilon pro la neceso lin kaŝi kaj konstante zorgi por li. Tio ne sufiĉis, kaj parencoj kaj najbaroj, unu post alia, kunvenis en la drinkejo, por ŝin reciproĉi ĉiutage.

„Malprosperantan filon vi naskis“, diris iuj.

„Li venis en la mondon, por ribeli, renversi la registaron,“ mallaŭdis aliaj.

Por sin liberigi kaj por ke lia patrino havu trankvilon, li forkuris malproksimen kaj ne revenis plu. Tamen unu post alia alvenis sciigoj: laŭ unu oni persekutis lin per ŝtonoj kaj preskaŭ lin mortigis; laŭ alia kamparanoj lin renkontis ie kiel vagantan mizerulon, — fine je l' noktomezo migranto, hazarde veninta en la drinkejon, per terura sciigo rompis ŝian koron. En malproksima lando latina, reĝanoj kaptis Petron kaj kune, kun ĉiuj liaj kamaradoj krucumis lin viva. . . .

Kion ŝi komprenis de l' vivo, ne ĝuinte junecon, ne havinte trankvilon? — Ŝi eksopiris kaj direktis siajn rigardojn malproksimen, ŝajne aŭskultante en la murmureton de l' aŭtuno.

Knabinoj revenis de l' puto, malproksimaj ombroj ekaperis ĉirkaŭe, for el Jerusalemo treniĝis karavano da muloj, preta por longa vojo, kaj ŝi enpenŝiĝinte sur la sojlo forgesis stariĝi. Kaj pli ol unu el la karavanuloj haltis ĉe ŝi, sur la sojlo, por konsoli ŝin mallaŭte:

„Tiu, kiu dum lia vivo lin persekutis kaj malbenis, formortis, eĉ rememoro pri ili ne postrestis; kaj vian filon oni nomis sanktulo, kaj Dio en la ĉielo donis al li la ŝlosilojn de l' paradizo . . .“

„Ke almenaŭ en la alia mondo li havu trankvilon . . .“, ŝi diris elreviĝante. Kaj nur kiam ĉio ĉirkaŭe malaperis, la patrino de Petro ferminte la pordon de l' fiŝista kabano eniris la domon. Dum la nokto falis malvarmeta pluvo aŭtuna, la vento, kiel malfruiĝinta vojaĝanto, ekfrapis fenestrojn kaj pordojn; ŝi sidiĝis sola ĉe la fajrejo, kaj nur unu afero ŝin konsolis: Ĉar ŝia filo

okupas en la paradizo tiel gravan postenon, ankaŭ ŝi ne restos forgesita . . . Ifoje ŝi eĉ deziris en pensoj, ke baldaŭ Dio prenu ŝian animon, por ke ŝi pli frue kuniĝu kun sia filo . . .

Sed dum vintra nokto, sentante, ke proksimiĝas ŝia lasta horo, kaj malvarmeto de morto ekrapis sur ŝia korpo, ŝi denove ekamis la terajn turmentojn kaj, farinte krucosignon, ekpreĝis — ke Dio plilongigu ŝiajn tagojn, almenaŭ ĝis pasko. Longe ŝi tremadis, longe ŝi baraktis por konservi la vivon en siaj sekiĝintaj muskoloj, sed ĉiuj penoj estis vanaj. Ĉe malhela krepuskiĝo, ŝi sin trovis antaŭ la pordego de l' paradizo.

Ankoraŭ brilis la plenluno, sur la ĉielo klinis siajn kapojn dormemaj steletoj, kun voĉo mallaŭtiganta la torento murmuretis preter la paradizaj muroj.

Ŝi aŭskultis.

— Oni profunde dormas, sed li pardonu: mi ne povas atendi ĝis tagiĝo . . . Mi lin vekos! — Kaj ŝi ekfrapis sur la pordegon.

Nerevekeble dormas la senpekuloj. Nenio vekas ilin el ilia trankvilo. — Ŝi ĉirkaŭturnetis sin tien kaj aliflanken: neniu respondas. Kaj ŝi eĉ pli forte ekfrapis.

„He, kia trudema gasto venis! Kial li frapas? Ŝajnas, ke li ne povas plu iomete atendi . . .“ Leviĝis fine Sankta Petro kaj frotis siajn dormemajn okulojn.

„Kiu deziras eniri je tiu tempo?“ Li enigis la ŝlosilon en la pordegan seruron:

„Ne koleru, Petro! Estas mi, mi . . . Ĉu vi ne rekonas min? Via patrino! . . .“ ekstere ŝi diris spireginte.

„Ĉu vi, patrino?“ La sanktulo kuntiris la brovojn kaj haltis sur sia loko senmove. Ekbrulis fajro el li, kvazaŭ ekbrogante lian volon. Sed li kolektis sian viran forton. Kio do, se tio estas lia patrino? Dio lin ja faris gardisto de l' paradizo, por ke li indulgu nek parencojn, nek proksimulojn!

„Mankas loko ĉe Dio!“ li respondis mallaŭte.

„Kion? Ĉu mankas loko por mi?“ ekmiris la patrino, ne fidante al siaj oreloj.

„Kion vi faras surtere, tion vi trovos ankaŭ en la ĉielo! Treege vi kolerigis Dion. Kiom da mizeruloj vi forpelis de la pordo, kiom da proksimuloj vi forsendis — nenio instigis vian koron helpi al malriĉuloj . . .“

„Ĉu ankaŭ ĉi tie vi komencis pri la malriĉuloj!“ Ŝi interrompis lin, kaj malĝojo sufokis ŝian gorgon.

La sanktulo firme daŭrigis: „Kiam ni havis drinkejon ĉe la krucvojo, se venis komercistoj, vi per plena pokalo regalas ilin; se malriĉuloj volis aĉeti buteron, vi ĝin vendis al ili mankante. La ruĝan pipron vi vendis al ĉiuj vilaĝanoj miksitajn per brikaĵoj; en la farunon vi miksis polvon, en la lakton akvon. El fremdaj fiŝkaptejoj nokte vi forprenis la fiŝojn, kaj tamen vi murmuris . . .“

„Ĉu tio estas miaj pezaj pekoj, pro kiuj vi ne volas enlasi min?“ ŝi paŝis antaŭen kaj metis siajn manojn sur la bruston, unu sur alian. „Mi opiniis, ke ĉar Dio vin lasis ĉe tia posteno, almenaŭ vi plisaĝiĝis kaj tamen jen . . . Ĉiam la sama! . . . — Vi komencis citi miajn pekojn . . . Ĉu vi edukis unu infanon, ĉu vi restis dome, por scii, kiel edukiĝas kaj plenkreskas etaj infanoj? . . . Ĉu vi venis eĉ nur unufoje, por alporti ligneron, aŭ iel anstataŭigi miajn manojn . . .? Ĉu restis al mi, ŝargita per sinokupoj, tempo por ekpensi iomete pri mia animo!? Kiam vi, vagemulo, estis forkurinta, kiu endomigis vin, kiu ree sin pendigis al mia kolo? Vi fordonis ĉemizon de l' propra dorso al aliaj, — ĉar mi ŝpinis ĝin kaj vestis vin. — Sed ĉu mi aŭdis aproban diron de vi sur la tero? Kaj nun en la ĉielo mi klopodu argumenti . . .? Se vi ne enlasi min, mi ne petos! Mi estas hardita kontraŭ suferoj.“ — Svingante la manon ŝi ekiris sola al la malluma nokto de la infero, kiu bolegis tie.

Petro restis konsternita sur sia loko. — Ĉu ankaŭ ĉi tie Dio preparas terurajn tentojn por li? — Li ŝanĝis iomete sian lokon kaj fleksis siajn krurojn, por sidiĝi en la larĝan niĉon enigitan interne en la muro apud la pordego. Li apenaŭ memoras sian patron, kiam per ŝipo li lin kondukis observi fiŝkaptilojn. La patrino lin nutris kaj edukis kaj ĉiam esperis, ke li altkreskinte helpos al la malpli aĝaj gefratoj. Kaj kiam foje li riparigis la patran ŝipon, kiam li diris, ke li daŭrigos lian metion, ĉiuj pleniĝis de ĝojo. Tamen tiam la Instruanto venis en la vilaĝon kaj komencis fari miraklojn. Postiris lin junaj kaj maljunaj homoj. Oferis sin ankaŭ li: ĉar en Li estis la vero kaj la lumo.

„Mi ankaŭ mortos,“ diris ŝia patrino. „Ĉu vi opinias, ke tiu mondo estas tiom kara al mi? Se temus nur pri la mortado! Sed jen: al kiu lasi tiujn infanojn, kiu iomete zorgos pri ili?“

Petro malatentis tion. Li ekiris prediki la parolon de la Instruanto kaj pro tio li suferis ĉie riproĉojn kaj mizeron. Kiomfoje li revenis nuda, malsata, al sia patrino! Kaj ŝi, vidinte lin tie kompatinda, ekploris kaj denove lin enhejmigis. Tiam lia koro moliĝis, li ekbedaŭris sian patrinon kaj multfoje li ekdeziris resti dome. Sed la Instruanto ja ofte diris: „Kiu amas siajn gepatrojn, ne sekvu min . . .“

Frua matena aŭroro purigis la ĉielon. Unu post alia, blindaj kaj lamaj, senfortaj kaj palaj, ekiris sin lavi en la torento, karesanta la apudbordajn florojn de l' paradizo, kiu kaŝe fortrenis iliajn karesojn malsupren. Jen aŭdiĝis ankaŭ pia preĝo matena, de tie ĉi kaj de tie aperis la kredantoj, kaj ĉiuj miris, ne povante kompreni, kio konfuzis la sanktulon, ĉar li klinis sian kapon kiel pekulo.

Ĉi tie Dio mem ja donis al li la plej gravan postenon . . .

„Kian zorgon li povus havi?“ diris flanke la ĉifonpaŝtisto al preĝej-zorganto.

Sed ekĝemis profunde Petro, levante la kapon — se Dio vin allasis ĉi tien, se ĉiuj vin konas kaj scias pri vi, kaj nur tiam vi sentas, ke vi estas peka?

Li mallevis la okulojn, ŝajne, por kaŝi ĉion en si, kaj por ne konfuzi la spiriton de l' benitoj. Ĉiuj ĉirkaŭe reciproke ekrigardis unu la alian, levis la ŝultrojn, kaj neniu ion komprenis.

„Mi forsendis mian patrinon tiun nokton de la paradiza pordo . . .“ Li ne povis venki sin mem kaj aldonis meditante: „Dum sia tuta vivo por mi ŝi klopodis kaj filtris siajn okulojn, por ke mi estu tie ĉi, kaj ŝi . . .“

Sed dum li finis sian parolon, antaŭ li aperis nuda ciganino, kaj formetis sian mantelon:

„Mi vin instruos, Sankta Petro. Atendu! Vian patrinon mi iam petegis donaci al mi tiun ĉi mantelon: Jen ĝi estas,“ ŝi diris, „mi havas filon migrantan fremdlande, — pro lia sano — prenu ĝin. Nun vi prenu ĝin kaj iru por elteni ŝin el la infero. Se ĝi ne estis al ŝi kara, kiam ŝi ĝin al mi donis, ĝi ne disŝiriĝos . . .“

Kaj la sanktulo prenis la mantelon kaj ekiris al la infero. Tie jam de malproksime resonadis laŭtaj paroladoj de sorĉistoj kaj maljunuloj, malkvietaj disputoj bolis inter instruistoj kaj saĝuloj kaj sufokiĝintaj krioj aŭdiĝis inter la sonoro de hakiloj kaj glavoj . . .

El bulgara lingvo tradukis *Silvestriev*,
eksleŭtenant-kolonelo, Ŝumen.

Transe.

Sur ondo mola balance dancanta
Mi kuŝas ĉion forgesi jam preta,
Kaj ia dolĉa senespera kanto,
De l' ondaj plaŭdoj kaprice ritmata,
Per litaniaj preĝas modulaĵoj.
Lulas lulilaj mildvoĉaj ekĝemoj,
Sonaj ekstremoj, ritmaj hezitadoj,
De l' litanio preĝata sur maro.

Ie en mondo restis mia sorto.
Tre malproksimen de ĝi mi foriris.
Kaj ne bedaŭras mi, ke tiel estas,
Ke mi fariĝis sensorta, senhejma,
Kiel la ondo de la oceano,
Kiel la ondo balance dancanta,
Kiu posedas nek hejmon, nek amon,
Kiu sencele vagas tra senlimo
De l' oceano lazura. —

Kaj en animo, kiel en ondaro,
Sonaj ekstremoj, ritmaj hezitadoj,
Lulas lulilaj mildvoĉaj ekĝemoj,
Per litaniaj preĝas modulaĵoj
De l' ondaj plaŭdoj kaprica ritmado,
Kaj ia dolĉa senespera kanto.

Sur oceano de mia animo
Mi kuŝas, ĉion forgesi jam preta,
Sur ondo mola balance dancanta . . . *M. Kalina.*

Fabeletoj.

De F. Sologub.

Guto kaj polvereto.

Guto falis en pluvon, polvo kuŝis sur la tero.

La guto volis kuniĝi kun estaĵo malmola, la naĝado en libero tedis ĝin.

Ĝi kuniĝis kun la polvo, — kaj sin kuŝigis sur la teron fariĝante peceto da koto.

Lampo kaj alumeto.

Sur tablo staris lampo.

Oni demetis de ĝi la lampovitron; la lampo ekvidis alumeton kaj diris:

„Malproksimiĝu, vi estaĵo, mi estas danĝera, mi baldaŭ ekbrulos. Mi estas bruligata ĉiuvespere, — sen mi oni ne povas labori vespere.“

„Ĉiuvespere!“ diris la alumeto, „ĉiuvespere ekbruli, — tio estas terura!“

„Kial do?“ demandis la lampo.

„Nur unufoje oni povas ami!“ diris la alumeto, ekbrulis, — kaj mortis.

La estontoj.

Neniu scias, kio estos.

Sed ekzistas loko, kie la estonteco iĝas videbla tra la diafana teksaĵo de l' deziro. Tio estas la loko, kie ripozas la ne jam naskitoj.

Tie estas agrable, trankvile, senbrue. Ne estas malĝojo, kaj anstataŭ la aero estas disverŝita atmosfero de pura ĝojo, en kiu facile spiras la nenaskitoj.

Kaj neniu foriras el tiu ĉi lando, ĝis kiam li volos.

Tie estis kvar animoj, kiuj volis naskiĝi je la sama momento sur nia tero.

Kaj en malpeza nebulo de deziroj montriĝis al ili niaj kvar elementoj.

Kaj diris unu el la estontoj:

„Mi amas la teron, la molan, varman, solidan.“

Kaj la dua:

„Mi amas la akvon, ĉiam falantan, malvarman, klaran.“

Kaj la tria:

„Mi amas la fajron, la gajan, luman, purigan.“

Kaj la kvara:

„Mi amas la aeron, ĉie disvastigantan la facilan aeron de l' vivo.“

Iliaj deziroj plenumiĝis.

La unua iĝis karbofosisto, — kaj dum la laboro falinta ŝaktoplafono superŝutis lin.

La dua verŝis larmojn kiel akvon kaj finé dronigis sin.
La tria mortbrulis en brulanta domo.

Kaj la kvaran oni pendumis.

Senkulpaj, puraj elementoj . . . Malsaĝeco de la dezirantoj.

Ho, dolĉa loko de neesto, kial la Volo forkondukis ilin
de tie!

El rusa lingvo tradukis *L. Harlamb*, Ismail.

La azeno kiu kapablis mallabori.

(Orienta fabelo, laŭ *G. Guatteri* en „Scena Illustrata“.)

Rhamas-Salah estis brava kampulo de Ain-Sefra (Alĝerio). Li ne estis tre riĉa, sed posedis belan kampon ĉirkaŭitan per arbetoj, nur unu kabanon el seka argilo kaj plugilon, boveton, azenon, kiuj per sia laboro helpadis al li. Li kontentiĝis pri sia stato eĉ opiniante, ke li estas feliĉa, kaj pro tio li ĉiutage benadis la sanktan nomon de Allah, kies protekton li alvokis por sia familio kaj sia malgranda bienaro.

Sed jen iutage — iun malbenan tagon, ho ve! — Si-Omar, lia azeneto, kiu estis tiel rapidega kaj inteligenta, marŝinte longtempe sub la sunradioj, trinkadis avide grandan kvanton da akvo, kaj ĝia blanka ventro rondeta ŝvelis, ŝvelis supermezure. Kaj jam ne povante subteni sin per siaj piedoj, la azeno kuŝiĝis teren, rigardis malĝoje Rhamas-Salah'on kaj la frankvilan boveton kun pensemaj okuloj kaj redonis sian malgrandan spiriton al Allah, kiu tuj ekspedis ĝin al la mahometa Paradizo, pro tio ke Si-Omar estis vere bona azeneto.

Necese do Rhamas-Salah, longe priplorinte la kunulon de sia laboro, iris al la bestvendejo por aĉeti al ĝi posteulon. Sed li vane serĉadis en la popolamaso de araboj kaj kabiloj, alkurintaj por vendi siajn diversajn komercaĵojn: li ne trovis sian negocon. Tiam li pensis, konfidi sian ĉagrenon al sia barbiro, tiu „ eminentulo“, kiu skrupule razadis al li la harojn, nur lasante hartufon, per kiu Mahometo ekkaptos lin por lin transporti en la juĝodecida tago al sia Paradizo.

Barbiro estas en la orientlandoj sciencema homo: li razas la barbon, tondas la harojn, „sangeltiras kaj laksigas“ la klientojn, informas ilin pri ĉiuj babilajoj, kiuj rondiras tra la vilaĝo; rakontas inter razado kaj tondado faktetojn kaj faktaĉojn de siaj proksimuloj; li tute scias la prezojn de l' tritiko, lano, kafo, kameloj, ŝafoviroj. Li estas, konklude, informa puto, same kiel liaj kolegoj okcidentaj.

La barbiro ne kaŝis al Rhamas-Salah, kiu faris la apologion de sia mortinto, la malfacilecon trovi alian vivantan azenon, kiu plene kontentigus lin.

„Sed povas esti,“ li aldonis, „ke per helpo de Allah vi trovos unu inter tiuj vendeblaj ĉe la kazerno de la mitrajlistoj.

Tie estas multaj, kiuj revenis el la milito, kie ili jam portis sur la dorso municiojn kaj armilojn de la soldatoj kaj tiun specon de pafilo tripieda, kiu semas kugletojn kiel hajlerojn. La milito certe facilmovigis ilin. Iru do al la kazerno: vi trovos laŭplaĉan negocon!

Rhamas-Salah tion ne dirigis al si dufoje, kaj, alvokinte la benon de Allah kaj de l' profeto sur la indan barbiron kaj ties familion, li kuris al la kazerno de la mitrajlistoj, kie per malmulte da mono li aĉetis belan azeneton, kiun li kondukis hejmen.

Ourida, la filino de l' kampulo, estis ravata ekvidante la akiraĵon de sia patro. Ŝi diris ke oni devas nomi ĝin Si-Sliman kiel la Kadi'on, kiun la azeno similas fermante la okulojn. Kaj ŝi tuj alkondukis ĝin apud la boveton.

La morgaŭan matenon Rhamas-Salah jungis la boveton al la plugilo kaj laborigis al ĝi kampoarton. Kaj tiel estis dum kelkaj tagoj. Sed iun tagon, en kiu pli ol kutime estis forta kaj laciga vaimo, la boveto reeniris melankolie en la stalon kaj konfidencis al Si-Sliman, ke ĝi sentiĝas morteme laca.

„Kial ci ne ripozas?“ diris al ĝi la azeneto.

„Mi bone ripozus. Sed ĉu ci opinias, ke nia bona mastro (kiun Allah konservu!) lasus min en la stalo senlabore?“

„Ĉu nur tion? Ja oni vidas, ke ci neniam estis ĉe la soldatoj kiel mi; pro tio ci ne lernis mallabori.“

„Mallabori? Se ci sukcesos lernigi al mi, kiel oni mallaboras, mi volonte penos tion fari.“

„Tre simple,“ diris la azeno, kiu sciis sian aferon. „Morgaŭ matene, kiam venos la mastro por jungi cin, ŝajnigu, ke ci estas malsana kaj ke ci ne povas stariĝi. Se li devigos cin stariĝi, lamu!“ —

La bovo dankis sian kamaradon kaj la alian tagon faris, kiel estis al ĝi konsilite. Ĝi ludis sian rolon tiel bone, ke la vilaĝano ne kuraĝis laborigi ĝin kaj lasis ĝin pace en la stalo.

Sed jen iumatene Rhamas-Salah, enirante la stalon kune kun sia filino, diris al ŝi: „Ourida, ĉu ne ŝajnas al vi, ke mi faras malbone ne uzante la azeneton por plugi?“

Kaj tiel dirante, li elirigis la azenon kaj aljungis ĝin. Laborinte la tutan tagon, la azeneto revenis vespere ne subtenante sin pro laceco. Kaj dum kelkaj tagoj estis tiel. Sed iuvespere la azeno, kiu komencis enui pri tia laboro malproporcia je siaj fortoj, diris al la bovo: „Mia amiko, mi timas, ke ci finiĝos malbone. Mi aŭdis la mastron diranta al sia filino: Jen tiu bovo tute lamiĝis, kaj ĝi jam ne taŭgas por labori. Kompense ĝi grasiĝis; tial mi kondukos ĝin al la buĉisto.“

Tiuj vortoj estis tre malagrablaj al la boveto; tamen ĝi diris nenion. Sed kiam la sekvantan tagon la mastro eniris, ĝi rapide stariĝis kaj iris renkonte al li por vidigi, ke ĝi ne lamas plu.

„Estu naŭfoje benata Allah!“ ekkriis la kampulo. Kaj tute kontenta li rapidis jungi la boveton al la plugilo, dume la azeno,

de nun malmobilizita, streĉadis la piedegojn pro ĝojo, pensante pri la ruzo, kiun ĝi estis ludinta al sia kunulo.

Sed samtempe jen aŭdiĝis la tre dolĉa voĉo de Ourida, kiu diris al sia patro: „Patro mia, kial vi ne jungas apud la bovo ankaŭ la azenon? Dum la ĵus pasintaj tagoj Si-Sliman pruvis, ke ĝi bone kapablas labori, kaj mi kredas, ke kunigante la du bestojn al la plugilo, la sulkon ni faros pli profunde kaj la laboron pli rapide.“

Tiufoje la vortoj estis malagrablaj al la azeno. Simile okazas hodiaŭ al tiuj, kiuj hieraŭ konsilis malice.

El itala lingvo tradukis *F. Cesarini*.

Naciaj moroj kaj kutimoj de Stockholmaj laboristoj.

Moro, kiu dum la lastaj jaroj disvastiĝis pli kaj pli en nia lando, ne malplej en Stockholm, estas tiu: fari novjara maldormon. La liber-religiuloj ĝenerale sekvas la kutimon atendi en siaj diservdomoj kaj kunvenejoj je piaĵoj, kantado kaj preĝo la noktomezon, kiu formas la limon inter la pasinta jaro kaj la venonta. Nur unufoje la pastraro de nia ŝtateklezio aliĝis al tiu moro, kaj tio okazis ĉe la fino de la lasta jarcento; tiam la paroĥanoj estis vokitaj en siajn preĝejojn por fari novjara maldormon. Ankaŭ diversaj profanaj societoj havas la kutimon aranĝi pli-malpli festajn kunvenojn por soleni la jarfinon.

Unua kiel la alia tamen okazas interne de la kvar domomuroj, sub altaj templaj arkaĵoj, en vastaj kunvenaj haloj aŭ en sufokaj festĉambroj. Ĉe neniu el tiuj okazoj la novjara maldormo povas pretendi iun aparte svedan aŭ alilandan karakteron.

En unu loko de nia lando la novjara maldormo tamen alportas humoron, kiu rajte povas esti nomata nacia. Ankaŭ la ĉirkaŭaĵo, kie la maldormo okazas, portas tute svedan karakteron, simile kiel la celo de la tuta fondaĵo en la loko priparolata estas doni por montro kaj informo de nunaj kaj estontaj generacioj la atestojn pri moroj, kutimoj kaj vivado de la sveda popolo en festaj kaj laboraj tagoj. Tiu loko estas en Djurgården (= Bestoĝardeno) apud la ĉefurbo de Svedujo kaj estas konata en la tuta regno kaj ankaŭ malproksime en fremdaj landoj sub la nomo Skansen (= Remparo), la grandioza patriota kreaĵo de la mortinta doktoro Artur Haselius.

Jam frue en la posttagmezo de la lasta tago de l' jaro irantoj aperas direktante siajn paŝojn supren al Skansen, kie ili, se ili deziras, en la alta subtegmenta ĉambro estas servataj de Lucia kun lumkrono sur sia kapo je varmigita alkoholaĵo kaj en la vilaĝaj dometoj povas vidi la stelportajn knabojn, same kiel la avo kaj avino iam ilin vidis, sed kiujn oni apenaŭ vidas en nunaj tagoj aliloke ol en Skansen. Sur la herbaj

verdaĵoj kaj la deklivoj de la vasta teritorio kuŝas dum la nov-jara antaŭvespero blanka kovro el neĝo, en kiu la someraj vojoj nun estas malfermataj per neĝoplugilo kaj per ŝoveliloj por la pli kaj pli densiĝantaj amasoj da vizitantoj: maljunuloj kaj maljunulinoj, viroj, virinoj kaj infanoj.

De sur la alta montplato, precipe de la parto, kiu estas nomata *Solliden* (= Sundeklivo), la ĉefurbo ŝajnas etendiĝi sub niaj piedoj, kaj kontraŭ la malhele blua fondaĵo de la sursemita je steloj ĉielo de la vintromeza nokto desegnas sin la konturoj de la reĝa palaco, de la preĝejoj, turpintoj kaj tegmentaj konturoj de la altaj domoj, dum longaj vicoj da gaslanternoj signumas la stratajn trajojn inter la domvicoj, de kiuj brilas tie ĉi kaj tie lumigitaj fenestroj.

Sed pri la vivado kaj disputado, pri la malkvieto kaj klopodo, — kiuj tie malsupre bruadas antaŭen kiel en konstante fluanta rivero, haltigata je sia kurado de nedaŭra refluo nur dum la unuaj horoj de la tago — oni tie ĉi supre apenaŭ havas pli ol supozeton. Sed ankaŭ ĝin oni volas forpeli, ĉar tie ĉi supre — jes, ĉu iu svedo, kiam ajn li venas tien ĉi supren, povas ne senti sin kunapartena kaj responda al tiu sveda popolo, kiu kun virto kaj bonaj moroj, kun kontentema animo loĝis en dometoj, simplaj kiel la tie ĉi konservataj, kun pinoj, abioj kaj betuloj kiel gardo, kaj kiu vivis modestan sed laboreman vivon ĉe riveroj, sur montoj, en valoj?

Tie ĉi supre — en ĉirkaŭaĵo de vera antikve sveda karaktero kaj en la ensorĉa lumo de brulkrakantaj gudrobareloj, de fumiĝantaj torĉoj kaj de brulantaj gardfajroj — oni ne povas ne esti kaptata de mirinda sento. Oni ne povas ne senti sian koron varmiĝanta je fieraj patriotaj memoraĵoj, kiuj tie ĉi estas elvokataj al nia interna vido; oni ne povas ne pensi grandajn svedajn pensojn. Oni sentas sian animon pleniĝanta je fiero pri tio, kion povis nia popolo kaj kio estis nia lando, samtempe oni estas kaptata de profunda melankolio pri tio, kio ĝi povus esti sed ne estas kaj pri tio, kio ĝi devus esti, kaj de antaŭtimo pri tio, kion la estonto portas en si al la lando kaj al la popolo de Svedujo.

Bing! Bong!

La sonoriloj de la Håsjö- (Hoŝe-) sonorilejo komencas forsonigi la malnovan jaron. La amasoj kolektiĝas ĉirkaŭ la maljuna sonorilejo kaj ĉirkaŭ *Renberget* (= la Nordcerva monteto), silentaj kaj solenaj. Je la noktomezo oni ekkantas la himnon: „Vår Gud är ors en våldig borg“ (= Ho Dio, nia firma fort’), kaj ĉiuj, maljunaj kaj junaj, kunkantas, dum preskaŭ ĉiuj viroj malkovras siajn kapojn. La momento estas plena de piegeco, kaj ĉies animoj suprenleviĝas je noblaj sentoj kaj je altaj pensoj.

La lastaj horobatoj de la malnova jaro formortas en la spaco. Tie supre sur la supra rando de *Bredablick*

(= Vastrigardo) la nombro de l' jaro brilas je brilanta fajra skribaĵo. La sonoriloj de la Hellestad-sonorilejo nun je sia vico komencas ensonorigi la novan jaron.

Bing! Bong!

„Var hålsad, sköna morgonstund!“ (= Saluton, bela vi maten'!). Oni ja ne kantis tiun ĉi belan kristnaskan psalmon, sed ĝi — por iiel diri — „kuŝis en la aero“.

Hura-krioj sonas, kaj gajaj voĉoj laŭte elparolas al konatoj kaj nekonatoj la deziron: „Bonan novjaron!“

Ankoraŭ iom da tempo grandaj popolamasoj restadas en la proksimo de la granda gardfajro, kiu brulas sur Renberget, dum aliaj estas enirantaj en la vilaĝdomojn por varmigi sin ĉe la fajro de trabligno, kiu hejmagrable flamas en la malfermita kameno.

Sed antaŭ ol la unua horo de la nova jaro finiĝis, ĉiuj miloj da homoj estas for, ĉar la pordegoj de Skansen estas fermataj je la unua en la nokto. Dum la hejmeniro iu eble diras al siaj kunirantoj fieran vorton pri ekvekitaj memoraĵoj de „la antikve grandaj tempoj“ de Svedujo, kaj oni eldiras ankaŭ iun bravan esperon pri la estonta rolo de la sveda popolo kiel la gvidanta forto *por* kaj *en* unuanima kaj sendependa Skandinavujo.

G. F. H.

El la sveda lingvo tradukis *Sven Valerius*.

Estis tri gajaj junuloj . . .

Laŭ R. Presber.

Estis tri gajaj junuloj,
flamintaj al unu knabin'.
Unua sentis danĝeron
kaj frue evitis ĝin.
Kunpakis siajn valizojn,
forkuris trans mont' kaj mar',
kaj vivas riĉa jun-fraŭlo,
feliĉe en Sansibar.

La dua foriris kun larmoj,
skuata de ploro kaj ĝem',
kaj el la tuta ĝemado
naskiĝis fine — poem'.
Per multaj lirikaj versaĵoj
li kantis pri sia sufer',
fariĝis glora poeto,
konata sur tuta ter'.

La tria nur estis malsaĝa,
tuj tion vidos vi:
li amis ŝin tiel forte,
ke li — edziĝis kun ŝi.
Nun faras li stultan miĉnon,
sidante en la angul',
dum ŝi pri ambaŭ aliaj
rakontas kun larm' en okul' . . .

Esperantigis D-ro Emil Pfeffer.

Humoro.

Unu pli saĝa ol alia.

De *J. Pumpurmikelis*.

Foje kamparano, kiu ne povis toleri, ke lia dungito Petro faris ĉiun laboron tre malrapide, volis doni al li instruon. Kaj tio okazis jene:

Iam frumatene ili ambaŭ iris al herbejo falĉi fojnon. La kamparano iris malantaŭ Petro. — „Tiel malrapide irante, ni atingos la herbejon nur posttagmeze, Petro! Komencu ĉasi: mi estos leporo, vi hundo. Mi volas vidi, ĉu vi kaptos min ĝis la herbejo.“ — Petro estis preta. La kamparano ekkuris, Petro demetis sian falĉilon, postkuris la estron, kaj ambaŭ spiregante atingis la herbejon. La kamparano ridis pri sia saĝeco. „Vidu, Petro, vi ja ne kaptis min; sed kie estas via falĉilo?“ Petro respondis: „Mi ankoraŭ neniam vidis hundon, kiu kun falĉilo kuras por kapti leporon. Tial ankaŭ mi demetis mian falĉilon.“ La mastro nun vidis, ke nenio helpas. Sed Petro reiris, paŝante malrapidete, por preni sian falĉilon.

El latva lingvo tradukis *A. Urstin*.

Diversaj humoraĵoj, senditaj de *B. A.*

Rimedo por esti sana.

Elektu al vi sanajn kaj riĉajn gepatrojn! Naskiĝu de ili kaj devigu ilin bone nutri kaj eduki vin!

Ne fian.

Cigano perdis per morto malgrandan filon. Je la funebraj ceremonioj la patro estis senkonsola kaj ploregis.

La pastro diris al li: — Ne ploru, Stepaniĉ! Vi estas juna homo, al vi Dio donos ankoraŭ pli ol unu fileton.

— Ne, pastro; tio ne estos plu: Dio ne donos tian fileton; li estis nur tre malgranda — dujara — kaj jam ŝtelis ĉe najbaro tri kulerojn; unu li ŝtelis, estante eĉ nur duonjara!

En laktovendejo.

La vendisto disverŝas la lakton en botelojn kaj duonbotelojn. Lia fileto rigardas kaj demandas:

— Paĉjo, paĉjo?

— Kio estas al vi?

— Kiom da duonboteloj estas en botelo?

— Tio dependas de la aĉetanto.

Kuracilo por ĉiuj malsanoj.

Prenu naztukon de 50-jara fraŭlino (virgulino) neniam pensinta pri edziniĝo, lavu ĝin en rivero, en kiu neniu sin banis iam, sekigu ĝin je barilo de instituto, kie estas farata nur bono, gutigu sur ĝin la inkon de advokato, kiu neniam trompis klienton, kaj fine per la tiel preparita naztuko tuŝu la malsanan lokon doktoro, kiu ne mortigis eĉ unu solan pacienton.

Inter kuracistoj.

- Aŭskultu, ĉu vi forveturos eksterlanden en nuna jaro?
- Al kiu do mi transdonu miajn pacientojn?
- Al D-ro X! Li ŝajnas esti tre kapabla kuracisto.
- Ĝuste tio ja estas mia malfeliĉo. Pasintan jaron mi transdonis al li miajn pacientojn; sed kiam mi revenis, li estis resaniginta la plej bonajn el ili, — la malsaĝulo!

Malĝojigaj okazintaĵoj.

Tre eta literaturisto fanfaronis en societo, ke li naskiĝis en la sama tago, en kiu mortis Puŝkin. — „Ambaŭ ĉi tiuj okazintaĵoj estas tre malĝojigaj por la rusa literaturo!“ respondis al li unu el la ĉeestantoj.

Konsolo.

Edzo (reveninta el eksterlando): Kies ideto estas tio?

Edzino (kun infano): Ha, mia animo! Dum vi forestis, mi multe ploris kaj tiel enuis, ke — por konsoli min — Dio sendis al mi ĉi tiun anĝeleton.

En magazeno, kie oni vendas teon kun „premioj“.

- Kiom kostas funto da teo?
- Du frankojn.
- Kaj premio?
- Premio estas senpaga.
- Hm. Bonvolu doni al mi premion sole!

.....

Ŝercdemandoj.

De Leo Fiedler, Breslau.

Kio estas tio? Oni iras en butikon, devas longtempe atendi antaŭ ol esti servata, rigardas la objektojn, sed aĉetas nenion aŭ nur malofte, eĉ oni ankoraŭ lasas tie ion, kion oni posedis, kaj pagas malgraŭ ĉio.

Tio estas barbirbutiko.

Ĝi portas sian sinjoron kaj estas portata de li. Kio estas tio?

La sandalo. — La plando. — La biciklo.

Kiu posedas tian forton, ke li povas haltigi vagonaron per unu mano?

La lokomotivisto.

Kiu diferenco estas inter anglo kaj viandbrogaĵo?

Anglon oni nomas ankaŭ „John Bull“ kaj viandbrogaĵon ankaŭ „buliono“.

Kio estas pli nuda ol nuda, tiel nuda, ke ĝi krakas?

La skeleto.

Kio estas pli rapida ol penso?

La flakroĉevalaĉo. Kiam oni pensas, ke ĝi falos, ĝi jam kuŝas.

Kiam ĉambro havas viglan tapetornamajon?

Kiam malantaŭ la tapeto svarmas la ovoj.

